

La Premio La Verko de la Jaro, konversacio kun Giorgio Silfer

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 563-88A-1, 1982 .

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-88A/SRI-1982-88A-1-563-Claude-GACOND-La-Premio-La-Verko-de-la-Jaro-konversacio-kun-Giorgio-Silfer.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia sinjoro Claude Gacond.

Ĉi-semajne ni havas la okazon babili kun s-ro Giorgio Silfer, la direktoro de la Kooperativo de Literatura Foiro, pri la temo, La Premio La Verko de la Jaro. S-ro Silfer, vi povus unue fari tre rapide rememorigan historion pri La Premio La Verko de la Jaro, ekzemple dirante, kiel ĝi lanĉiĝis kaj kiel ĝi poste evoluis.

GS.- Volonte ! La Premio La Verko de la Jaro naskiĝis antaŭ ses jaroj, eĉ sep, ni diru. Tiatempe ekzistis jam iu iniciato kadre de Literatura Rondo la Patrolo, kiu estis la eldoninto de Literatura Foiro. Temis pri diversaj literaturaj konkursoj, kies celo estis malkovri novajn talentojn. Fakte, en 1975-a la Literatura Rondo rimarkis, ke estas necese krei pli konstantan kaj pli efikan rilaton inter la verkistoj kaj publiko. Kaj pro tio oni pensis pri nova formulo, tute nova kaj tute originala el la vidpunkto de esperantujo, sed ne el la vidpunkto de la ne-esperantista mondo. Ĉar fakte en la ne-esperantista mondo la plej multo de premioj, kiuj havas iun signifon estas tiuj, en kiuj oni premias jam aperintan verkon kaj ne simple iujn poemojn aŭ novelojn senditajn specimene, unuavice, unuafoje aŭ simile.

Cl.- Ĉu oni ne povus diri, ke tamen estas diferenco, ĉar kutime oni kandidatiĝas kaj por la premio La verko de la jaro oni ne kandidatiĝas, ĉu ne ?

GS.- Fakte ne, fakte ne. La kandidateco dependas nur de la fakto ĉu verko plenumas aŭ ne certajn kondiĉojn, kiuj estas pure teknikaj. Do, ili tute ne rilatas al la estetika valoro de la verko. Sufiĉas, ke tiu verko estu almenaŭ pli ol 50 procente en esperanto, originale verkita, ke ĝi havu certan minimuman amplecon, ktp. Do la kandidateco tute ne dependas de la deziro de la aŭtoro aŭ de la eldonejo. Sed fakte tiu kandidateco portas ekzemple al la eldonejoj rimarkindan helpon, ĉar ĝi permesas diskonigi la librojn, kiujn ili eldonis.

Cl.- Sed en la aliaj lingvoj tiam oni kandidatiĝas, ĉu ne, por povi havi premion ?

GS.- En la aliaj lingvoj estas jes kaj ne tiel. Do, la minoraj konkursoj en la aliaj lingvoj, do tiuj, kiuj malkovras amatorojn aŭ komencantojn aŭ debutantojn, estas aranĝitaj laŭ la strukturo de la belartaj konkursoj de UEA. Male, se temas pri tre grandaj premioj, kiel povas esti Goncourt por la franca, kiel povas esti Strega por la itala. La kandidateco ne dependas de la aŭtoro ĉiukaze. Ekzistas diverstipaj premioj, ekzemple en Hungario estas premio kiu estas asignita al la libro kiu plej multe vendiĝis. Do tio eĉ estas simple statistika fakto.

Cl.- Estas do por la sesa fojo referendumo ĉi-jare ĉe la legantoj de Literatura Foiro, kaj ankaŭ se mi ne eraras, ĉe aliaj kunlaborantaj revuoj. Ili esprimos sian vidpunkton rilate al la originalaj verkoj prozaj kaj poeziaj aperintaj pasintjare. Kiom da tiaj verkoj aperis ?

GS.- La verkoj, kiuj estas kandidataj por la premio La verko de la jaro 1981-a estas kvar. Mi volus diri ĉi tie, ke la referendumon partoprenos ĝuste ne nur la abonantaro de Literatura Foiro, sed ankaŭ la abonantaro de la revuo Konkize. Tio signifas, ke principe la literaturema kaj principe la junulara publikoj partoprenos en ĉi tiu voĉdono. Same okazis en pli fruaj eldonoj de la premio. Okazis ekzemple ke pri la premio de la jaro 1979-a partoprenis ankaŭ la abonantaro de Kontakto.

Cl.- Ne plu Kontakto ĉi-jare.

GS.- Kontakto jes, en la senco ke la abonantaro de Konkize ricevas ankaŭ Kontakton, aŭ pli bone, la abonantaro de Kontakto ricevas ankaŭ Konkize.

Cl.- Do, estas kvar verkoj. Ĉu tio signifas pli da verkoj aŭ malpli ol la pasintaj jaroj. Ĉu vi povus prezenti al ni specon de panoramo statistika, ni diru.

GS.- Jes. Kiel nombro da verkoj estas malpli ol kutime, sed kiel nombro da paĝoj estas pli ol kutime, mi dirus. Ĉar en la pasinta jaro ekzemple ni havis kvin kandidatojn el kiuj tamen tri estis la solaj - ni diru - kun sufiĉa nombro da paĝoj laŭ la reguloj de la regularo. Fakte, oni akceptis du, simple por havi aliajn poemarojn. Aliflanke, ĉi-jare ni havas specife romanojn. Estas tri romanoj kaj unu sola poezia libro partoprenas en tiu ĉi referendumo. Ni havas unu romanon de Johán Valano, la tria el la serio 'ĉu-a', Ĉu li venis trakosme, eldonita ĉe Torben Kehlet, Stafeto. Ni havas la libron de Karolo Piĉ, La Litomiŝla tombejo, eldonita de Artur E. Iltis en Saarbrücken. Sekvas Regulus de Lorjak, eldonita de Gabrielli en Ascoli Piceno. Kaj la sola poezia libro estas tiu de Reino Eriksson, La Ŝtona Testamento, poemaro parte en la finna kaj parte en esperanto, kio cetere ne estas novaĵo ĉar jam aperis kaj kandidatis verkoj, kiuj estis parte en esperanto, parte en aliaj lingvoj.

Cl.- Ĉu la legantoj donas preferon al prozo aŭ poezio ?

GS.- Ĝis nun fakte la prozo ĉiam estis preferata de la publiko, kvankam en du fojoj gajnis la premion du poeziaj verkoj. Kaj tio estas ĝuste la kazo ekzemple de la pasinta premio, kiu ĝuste iris al la libro de Nicolino Rossi Sur la vivopado, cetere eldonita de LF-Koop, estas tiu ĉi la dua libro eldonita de nia entrepreno, kiu atingas la favoron de la publiko. Plejmulte tamen ricevis laŭrojn la libroj eldonitaj de Stafeto, kiu trifoje gajnis la premion, pere de Johán Valano, kiam temis pri lia romano Ĉu vi kuiras ĉine? Kaj pri la dua romano el tiu Ĉu li bremsis sufiĉe ? Kaj trian fojon Kehlet/Stafeto gajnis danke al La Granda Kaldrono de John Islay Francis. Do ni diru ke ĝenerale ni rimarkas certan kontinuecon en la gusto de la publiko. La publiko bezonas librojn, kiuj estu bone verkitaj, kiuj eventuale ne estu speciale engaĝitaj, sed ankaŭ ili ne estas supraĵaj. Foje oni skribis en Literatura Foiro ke la publiko estas pli matura ol la opinifarantoj. Tiu ĉi estas kompreneble iom provoka titolo por iu artikolo, kiu volis komentarii la rezulton de la referendumo pri 1976-a, sed ni opinias, ke finfine estas efektive tiel, la publiko havas certan guston, estas fakto ke tiu gusto ne estas laŭ mi malalta. Estas fakto ke la publiko ĝis nun ne havis laokazon esprimi sin kaj tiu kontakto inter la publiko kaj la kreanto, kiun permesas la Literatura Premio La Verko de la Jaro, estas ĝuste la plej grava argumento por pravigi la ekziston de tiu ĉi premio kadre de la konkursa fako de nia ko kooperativo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Giorgio Silfer diskutis pri La Premio La Verko de la Jaro. Ĝis reaŭdo!